

# RADE INFORMILO

## ROTARIA AMIKARO DE ESPERANTO



RADE INFORMILO N.34

Septembro 2014



Pro diversaj kialoj neblis munti standon dum la Monda **Rotaria Kongreso en Aŭstralio**, sed jam RADE mendis sian standon por kunigi niajn membrojn en junio venonta en **Brazilo, São Paŭlo**. Preparaĵu por deĵori ĉe la stando de Esperanto!



de la 6-a ĝis la 9-a de Junio 2015 en Sao Paŭlo (Brazilo)

1. Kio okazas se vi tajpas <http://www.rotaryclubesperanto.org> sur Google ?  
Vi malkovros la retejon de nova rotaria klubo kiu uzas esperanton por komuniki.

The screenshot shows the website interface with the following elements:

- Header:** "Rotary eClub Esperanto" with the Rotary logo and "Distrikto 2050".
- Navigation:** "Hejmo", "Informaj", "eKluba Domo", "Projektoj", "Novaĵoj", "Oftaj demandoj", "Kontaktaj".
- Main Content:**
  - "LIGHT UP ROTARY" banner with a globe.
  - "END POLIO" banner with a globe.
  - A large certificate titled "This Certifies that the Rotary E-Club of Esperanto, Italia" with signatures and the date "September 1st of June 2014".
  - Two blue call-to-action boxes: "Reakiri la neeeston en kunveno de sia propra klubo" and "Vizitpeto al kunveno eClub Esperanto".
  - A partial box at the bottom: "Rotariaj eKlubo en la".
- Footer:** Browser address bar shows "http://www.rotaryclubesperanto.org" and the Windows taskbar at the bottom.

La nova **Rotaria eKlubo Esperanto (ReKE)**, estas rotaria elektronika klubo kiu kunvenas rete kaj uzante esperanton. Ĝi naskiĝis en la itala distrikto 2050, kie situas nun nia klubo Domo. ReKE (Rotaria eKlubo Esperanto) estis formale akceptita de ROTARY INTERNATIONAL kaj kunigas grupon de 24 fondinto-membroj. Dum la lastaj Esperanto eventoj pluraj esperantistoj esprimis la deziron ankaŭ konatiĝi kun RI kaj membriĝi en tiu nova formo. La kulturaj idealoj de Zamenhof pri internacia interkompreno kaj paca kunlaboro favore al la homaro estas ja tre similaj al la celoj de ROTARY INTERNATIONAL.

N.B.: RADE kunigas nun ne nur esperantistajn rotarianojn, membroj en kutimaj landaj kluboj, sed ankaŭ esperantistojn kiuj kreis ReKE.

**La RADE estraro invitas la novajn membrojn  
de la Rotaria eKlubo Esperanto (ReKE) senpage aliĝi  
per la aliĝilo sur la lasta paĝo de ĉi tiu eldono.**

## 2. Kio povos okazi ekde la kreado de Rotaria eKlubo Esperanto?

### RADE-anoj kaj ReKE-anoj povos kunlabori en diverstipaj projektoj

Estas tempo por diverstipaj partnerecoj kaj ni sekvas volonte tiujn novajn sociajn formojn por plifortigi kaj disvastigi idealismajn ideojn tra la mondo.

RADE membroj, per ReKE, nun povos pripensi novajn kulturajn, edukajn kaj humanitarajn projektojn inter la diversaj distriktoj, sen lingvaj baroj por realigi projektojn.

Ni prenu ekzemplon de la agado, kiu jam okazis laste inter la belga klubo Enghien (helpe de RADEano Michael Cwik), distrikto 1680, kaj la brazila distrikto 4530 kun brila sukceso en ekologia projekto pri savo de semoj de Amazoniaj altvaloraj arboj.


La sekvanta foto montras la ceremonion de la inaŭguro de tiu projekto.



N.B. : La estraro de ReKE avertas ĉiujn rotarianojn, membroj de RADE, ke ili estas invititaj viziti nian retejon ([www.rotaryclubesperanto.org](http://www.rotaryclubesperanto.org)) kaj ke tiu vizito povos esti enkalkulita por la asidueco.

### 3. Kio okazis dum la jaro 2014?

1. Nia RADE membro **Otávio Veiga**, en Brazilo, estas estonta distrikta guberniestro kaj saĝe agas por disvastigi Esperanton en sia medio. Ankaŭ li esperas sekve partopreni en nia ReKE kaj certe vizitos nian retejon.
2. **Wally Du Temple**, longjara rotariano kaj esperantisto en Kanado, jam vizitis nian klubon kaj planas aliĝi.
3. La **99-a UK en Bonaero** estis bona okazo prezenti RADE kaj ReKE al esperantistoj . Dum la **Movada Foiro**, RADE prezentiĝis kun okdeko da aliaj fak- asocioj de UEA, por montri sian aktivecon en la disvastigo de la Rotariaj celoj pere de Esperanto.



Nia stando



De maldekstre al dekstre : Ursula Grattapaglia, Joseph van der Vleugel, Lee Young-Koo, Lee Jungkee

4. Sed la kontribuo de rotarianoj dum la kongreso ne limiĝis al la partopreno en la Movada Foiro. Du novaj membroj de la Rotaria e-klubo Esperanto oficiale prelegis en la kadro de la Internacia Kongresa Universitato:  
**Sara Spanó** brile prezentis prelegon pri *UTOPIO: "ne lokoj" kaj "bonaj lokoj"*  
**Francesco Maurelli** ilustris sian disertacion pri *ONTOLOGIOJ: filozofia koncepto kaj robotikaj aplikoj*

La kongresa temo estis : "Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco." kaj **Ursula Grattapaglia** ilustris la temon dum la podiaj diskutoj helpe de sia sperto pri mediprotektado en Brazilo dum la UN konferencoj en Rio de Janeiro 1992 kaj 2012.



### Joseph van der Vleugel

faris prelegon bazitan sur la libro de profesoro de Duve (Genetiko de la origina peko : la pezo de la pasinteco sur la estonta vivo).



De maldekstre al dekstre : Ronald Glossop, Sara Spano, Joseph van der Vleugel, Ursula Grattapaglia, Giuseppe Grattapaglia, Francesco Maurelli.

5. Dum la kongresa semajno delegacio de membroj de la *eklubo Esperanto* kaj kelkaj kandidatoj por aliĝo, vizitis Rotarian Klubon en Buenos Aires por plifirmigi la

amikajn rilatojn inter la membroj de nia tutmonda organizaĵo. Fakte celo de RADE estas diskonigi Rotarion inter esperantistoj kaj Esperanton inter rotarianoj.



De maldekstre al dekstre : Sara Spano, Francesco Maurelli, Esther Schor, Joseph van der Vleugel, Jose Antonio Vergara, Wally du Temple, Ursula Grattapaglia, Michel Dechy, Ronald Glossop, Giuseppe Grattapaglia.

## 6. La 81-a Itala Kongreso de Esperanto okazis en FAI DELLA PAGANELLA .

Fai della Paganella, turisma vilaĝo en la Dolomitoj de Nordorienta Italio, gastigis ĉijare la kongreson de la Itala Esperanto Federacio. Kvankam evento je nacia nivelo, la kongreso allogis la partoprenon de pli ol 200 esperantistoj el 24 landoj. Invado de esperantistoj en malgranda vilaĝo estas multe pli efika, laŭ la celoj de informado, ol nia anonima ĉeesto en granda urbo, kiel bedaŭrinde okazis ĉijare en Buenos Aires !

La tuta vilaĝo estis ornamita per Esperanto afiŝoj. Neniu en tiu loko rajtas nun pri dubi, ĉu Esperanto mortis aŭ plenvivas!

Ankaŭ en Fai della Paganilla aktivis en la kongresa programo la membroj de nia e-klubo precipe danke al la partopreno de Sara Spanó kaj de nia prezidanto Davide Astori per lia serio de prelegoj pri interlingvistiko kaj Esperanto en Rotary.



Prelegas dr. Davide Astori en la urbodomo

### 7. Nia nova membro en Pollando

En la prestiĝa salono de la Klubo pri Literaturo kaj Muziko de la pola urbo Vroclav, membro de nia eklubo, **Malgosia Komarnicka**, prezentis la 2an de septembro dramon kiel simbola krio kontraŭ ĉiuj militoj, pri la odiseo de infanoj dum la Dua Mond-milito je la duflankoj. Temis pri manifestacio okaze de la 100<sup>a</sup> datreveno de la Unua Mond-milito kaj de la 75<sup>a</sup> datreveno de la Dua. Aŭtoro de la monodramo estas la pola TV ĵurnalisto Roman Dobrzynski, kiu jam ricevis inviton por prezenti la spektaklon en la Arta Programo de la venontjara Universala Kongreso en Francio.



**ROTARY INTERNATIONAL**

**R.A.D.E. Rotaria Amikaro de Esperanto**

Honora Prezidanto Eskil Svane – Svislando – [pouzasco@gmail.com](mailto:pouzasco@gmail.com)

Honora Prezidanto Marc Levin - Francio - [marc.j.levin@orange.fr](mailto:marc.j.levin@orange.fr)

Prezidanto Joseph Van der Vleugel – Belgio-[joseph.vandervleugel@skynet.be](mailto:joseph.vandervleugel@skynet.be)

Sekretario Giuseppe Grattapaglia – Brazilo - [bonaespero.brasil@gmail.com](mailto:bonaespero.brasil@gmail.com)

Estrarano Sherry Wells – Usono – [esperantosherry@tm.net](mailto:esperantosherry@tm.net)



Estrarano por Rotarakto Leandro Freitas – Brazilo – [freitas\\_letras@yahoo.com.br](mailto:freitas_letras@yahoo.com.br)

La Estraro de ROTARY INTERNATIONAL stimulas la rotarianojn kun komunaj interesoj pri profesiaj, humanecaj, kulturaj aŭ distraj aktivecoj starigi neformalajn grupojn por realigi la celojn de R.I.

La grupo RADE, konsistanta el rotarianoj, kiuj uzas kaj apogas la internacian lingvon Esperanto, celas realigi la idealojn de ROTARY INTERNATIONAL por la Interkompreno, la Amikeco kaj la Paco inter la nacioj, faciligi la personajn kontaktojn inter Rotarianoj de malsama lingvo-deveno kaj disvastigi la humanecajn internaciajn servojn de R.I.

Membriĝu senkoste en nia amikaro, se vi apogas niajn celojn,  
kiuj kongruas perfekte kun la kvar etikaj principoj de Rotary!

**Se vi apogas tiujn ideojn, partoprenu en nia grupo!**

1. **Nomo** .....
2. **Rotaria Klubo kaj Distrikto** .....
3. **Membro numero de R.I ek de kiam**.....
4. **Respondecoj en Rotary** .....
4. **Urbo kaj Lando** .....
6. **Adreso** .....
7. **Telefono kaj retpoŝto** .....
8. **Profesio** .....
9. **Esperanto parolanto ek de kiam** .....
10. **Parolataj lingvoj**.....
11. **Laŭvolaj pliaj informoj**.....
12. **Dato, subskribo**.....



**Bonvolu resendi tiun-ĉi aliĝilon al nia sekretario ([bonaespero.brasil@gmail.com](mailto:bonaespero.brasil@gmail.com))**